

LA JUNA BATALANTO

Organo de la Internacia
Katolika Junulara kaj Paca Movado

ELDONATA DE
MONDJUNULARO KATOLIKA, MOKA

Redaktoro : D-ro WILHELM SOLZBACHER.

ENHAVO :

Juna Batalanto, Kriza Tempo. — **Benedikto XV-a**, la Papo de la Paco. — **Pastro D-ro Wilhelm Schmidt, S. V. D.**, Rusujo kaj Ni. — **Theoderich Kampmann**, Dostojevski kaj Nia Tempo. — **W. S.**, Tra la Internacia Ekspozicio de la Katolika Junularo. — **Richard Kralik - Alois Norbert**, Unueca Lingvo. — **Interparolado pri la Katolika Esperanto-Literaturo**. — **Sur Nia Litrotablo**, Recenzo de Novaj Libroj de Internacia Intereso. — **Malgrandaj Notoj**. — **Bildoj** : Papo Benedikto XV-a. — La Tombo de Benedikto XV-a.

REDAKCIO : Köln — Dellbrück, Bensberger Marktweg, 63, Germ.

Eldonejo : ELDONA KOOPERATIVO LA JUNA BATALANTO,
Köln—Dellbrück, Bensberger Marktweg, 63, Germ. (Regina Solzbacher).

Abonprezoj de "La Juna Batalanto",

Normala abonprezo : jare 2 germanaj markoj, kun MOKA-membreco 3 M. La eldonejo akceptas monbiletojn, ĉekojn, poŝtmandatojn, respondkuponojn, germanajn poŝtmarkojn.

| Lando | jara abono | kun MOKA-kotizo | simpla kotizo | Lando | jara abono | kun MOKA-kotizo | simpla kotizo |
|-----------|------------|-----------------|---------------|-------------|------------|-----------------|---------------|
| Anglujo | 2 s + p | 3 s | 1 s 3 d | Hungarujo | 2.4 p | 4 p | 2 p |
| Argentino | 1.50 p | 2 p | 1 p. | Italujo | 9 l | 14 l | 5 l |
| Azio | 2 s | 3 s | 1 s 3 d | Japanujo | 2 s | 3 s | 1 s 3 d |
| Aŭstralio | 2 s | 3 s | 1 s 3 d | Jugoslavujo | 30 din. | 40 d | 15 d |
| Aŭstrujo | 3.40 s | 5 s | 2 s | Litovujo | 5 lit. | 7 l | 3 l |
| Belgujo | 3.50 b | 6 b | 2 b | Luksemburgo | 18 fr | 25 fr | 10 fr |
| Brazilio | 4 mr | 5 mr | 2 mr | Meksiko | 0.50 dol | 0.75 d | 0.30 d |
| Ĉeĥoslov. | 16 kr | 20 kr | 10 kr | Nederlando | 1.25 fl | 2 fl | 0.80 fl |
| Danujo | 2 kr | 3 kr | 1 kr | Polujo | 4 zl | 6 zl | 3 zl |
| Danzig | 2 g | 3 g | 1.20 g | Portugalo | 8 esc | 12 e | 5 esc |
| Francujo | 12 fr | 18 fr | 6 fr | Rumanujo | 80 lei | 100 l | 40 lei |
| Germanujo | 2 M | 3 M | 1.20 M | Svedujo | 2 kr | 3 kr | 1 kr |
| Grekujo | 38 dr | 50 dr | 15 dr | Svisujo | 2.50 fr | 4 fr | 1.50 fr |
| Hispanujo | 3 p | 4.50 p | 2 p | Usono | 0.50 dol | 0.80 dol | 0.30 dol |

Ni akceptas ankaŭ pagojn por duona jaro aŭ kelkaj jaroj. Membroj de MOKA ricevos ankaŭ aliajn publikigaĵojn. Donacoj por la subtena kaso (liverado de J. B. al malriĉuloj) estas invitataj.

Abonejoj : Krom al la eldonejo oni povas ankaŭ pagi al la naciaj sekretarioj de MOKA.

Poŝtkontoj. Germanujo : Köln 480 37 (Dr. Wilh. Solzbacher, Köln-Dellbrück); Francujo : Strasbourg 8180 (P. L. A. Muffang, Bourg-la-Reine); Aŭstrujo : Wien D 12.017 (Katholisches Kreuzbündnis für Oesterreich, Ortsgruppe Heiliges Feuer).

ESPERANTO EN LA SERVO DE LA INTERNACIA KATOLIKA AGADO!

Katolikajn informojn el la tuta mondo

rapide havigas al vi la dusemajna, grandformata, riĉe ilustrita gazeto KATOLIKA VIVO. Direktoro : Pastro Georges Ramboux, Paris.

La internacia katolika junulara kaj paca movado

eldonas por vi sian riĉenhavan, vivece verkitan, kuraĝe batalantan dumonatan organon LA JUNA BATALANTO. Redaktoro : D-ro Wilhelm Solzbacher, Köln.

Kombinita abono al Katolika Vivo kaj La Juna Batalanto

kostas por tuta jaro 6.— RM., por duona jaro 3.— RM. Oni pagas al Eldonejo La Juna Batalanto, Dr. W. Solzbacher, Köln-Dellbrück, Bensberger Marktweg 63, Germanujo aŭ al la Poŝtkontoj sciigataj sur la dua kovrila paĝo de ĉi tiu gazeto. Banknotoj, ĉekoj, poŝtmandatoj, respondkuponoj, UEA-kuponoj ktp. estas akceptataj.

NOTU la novan komunan adreson de la Internacia Oficejo de MOKA kaj de Redakcio kaj Administracio de LA JUNA BATALANTO: Köln-Dellbrueck, Bensberger Marktweg 63, Germanujo.

Kriza Tempo

Ni vivas en mondo, kiu estas plena je tensioj kaj eksploddaĝeroj. Kun malesperanta timo multaj homoj eniras en ĉi tiun vintron. Senlaboreco kaj en ĝia sekvo malsato kaj frosto estas teruraj fantomoj minacantaj milionojn. Politikaj radikaluloj, naciistaj kaj bolŝevistaj, plimultiĝas kaj klopodas gajni la ŝtatpotencon. En la malproksima oriento milito inter Japanujo kaj Ĥinujo ŝajnas neevitebla. Naturkatastrofoj neniam simile viditaj alportas morton kaj pereon al miloj kaj milionoj. La mondo estas skuata ĝis ĝiaj fundamentoj. Se ĝi nun almenaŭ ekkonus, ke ĝia sola savo ne konsistas en la batalo de unu kontraŭ la alia, en la egoismo kaj konkurenco, sed nur en frata kunlaborado!

En Ĥinujo milionoj malsatas, kaj centmiloj mortis pro malsato, dum ke en Ameriko oni hejtis la vagonarojn per greno kaj ŝutis tritikon en la maron. En Brazilio oni detruas grandegajn amasojn da kafo, dum ke multegaj homoj volonte prenis ĝin, se ili povus pagi. Unuj plendas pri troproduktado, dum ke aliaj malsatas pro manko de bonoj, kiuj aliloke estas « troproduktataj ». Freneza mondo! Kaj oni postulas de ni, ke ni kedu, ke tiu kapitalista ekonomia sistemo estas bona, justa, divolita! Stranga postulo! Nur ekonomio, kiu servas la tutan homaron, kiu donas panon al ĉiuj, kiuj estas pretaj por labori, povas esti justa. Ni serĉu ĝin! Sed la registaroj, anstataŭ elprovi pli bonan kunlaboron, plifortigas la doganbarilojn, pliakrigas la politikajn konfliktojn kaj ĝiajn kaŭzojn, ŝparas je bonfaraj celoj, malŝparas je armiloj destinitaj al mortigo kaj detruo.

La Sankta Patro dissendis novan enciklikon, kiu parolas ĝuste pri la ekonomia krizo kaj la armado. Ĝi alvokas la kristanan helpon en la mizero kaj alvokas la komprenemon kaj inteligentecon de la ŝtatestoj en la vetkurado de la armado. Pri tio li diras :

« La senlima vetkurado de la armado estas unuflanke rezulto de la rivaleco inter la nacioj kaj kaŭzas aliaflanke grandegajn elspezojn forprenatajn de la publika bonfarto. Tial ĝi estas ne la plej malgranda kaŭzo de la nuna krizo. Ni do ne povas preterlasi renovigi kaj fari Nia la seriozan averton de Nia antaŭulo, bedaŭrante, ke oni ankoraŭ ne komprenis ĝin, kaj Ni admonas vin, honorindaj fratoj, ke vi klopodu klerigi la spiritojn per ĉiuj disponeblaj iloj de la predikado kaj de la gazetaro kaj ke vi faru la korojn akceptemaj por la postuloj de la simpla logiko kaj ankoraŭ pli de la kristana leĝo. »

Prave la Sankta Patro plendas, ke oni ankoraŭ ne komprenis la seriozajn avertojn kaj postulojn de Benedikto XV-a. La 22 januaro 1932 estos la dekjara memortago de la morto de tiu granda Papo de la Paco, kaj kelkajn tagojn poste komenciĝos en Genève la granda Malarmada Konferenco. Ĉu la diplomatoj kaj politikistoj, kiuj dum la milito ne aŭdis la vortojn de tiu granda paca apostolo, almenaŭ nun aŭskultos la vokon el lia tombo? Almenaŭ inter ni, ĉu ne, karaj geamikoj, lia voko neniam estu

forĝesata. Ĝi trovu fortan elion en niaj junaj koroj, kaj ni volas laŭte elkrii en la mondon la kuraĝajn postulojn de la kristanismo, kiujn Benedikto XV-a tiel klare prezentis!

Kriza tempo! Ĝi ankaŭ sentigas per nia modesta agado. Ĝirkaŭ ni el la gazetoj, kiuj estis niaj iratoj en tiu aŭ alia laboro, multaj mortis en la lastaj monatoj. Ni ne sekvas ilin, sed kuraĝe daŭrigos la agadon. Sed niaj financaj eblecoj estas malgrandaj. Multaj amikoj skribas, ke ili eĉ la modestan abonprezon ne plu povas pagi. Ni esperu, ke aliaj montros solidarecan senton, pagante por ili, ĉar ni mem nur ĝis certa grado povas doni senpagajn abonojn. Bonvolu pripensi, ke la sama krizo, kiu malfaciligas la pagadon de la abonprezo, plinecesigas nian movadon kaj nian organon! Ni konfidu je vi, karaj gelegantoj, ni konfidu je nia bona afero kaj je la subteno de Dio, ke nia standardo forte staros en la ventego de la kriza tempo. Ni ja estas militistoj de la Regno de Dio, kiu estas regno de la paco!

LA JUNA BATALANTO.



BENEDICTO XV-a, LA PAPO DE LA PACO

Benedicto XV-a, la Papo de la Paco

La mondo preparas sin al la granda Malarmada Konferenco de Genève, kiu komenciĝos en februaro 1932. Kaj ankaŭ en katolikaj rondoĵoj oni multe diskutas la problemon de la malarmado. Tamen oni faras tion ofte tiel timeme kaj singarde, ke oni havas la impreson, ke oni tute ne vidas la plenan gravecon kaj danĝerecon de ĉi tiu momento. Certe estas nun utile kaj necese, rememori grandan pioniron kaj profeton de senmilita mondo. Papon Benedikton XV-an, kiu kuraĝe direktis la ŝipon de Petro dum la teruroj de la mondmilito.

Kiam la 3 septembro 1914 Giacomo della Chiesa, Kardinalo-ĉefepiskopo de Bologna, estis elektita papo, en la tuta mondo furiozis la milito. Kiel apostolo de la paco, laŭte vokanta, sed bedaŭrinde malmulte aŭskultata de la registaro kaj ankaŭ de la plej multaj katolikoj, lia tuta papa agado estis dediĉata al la laboro por la paco kaj al la riparo de maljustaĵoj kaŭzitaj per la milito. Jam kvin tagojn post sia elekto kiel papo li sendis al la mondo sian unuan alvokon: « La regantoj pripensu, kiom da mizero kaj doloro jam akompanas ĉi tiun teran vivon (kaj ke ne estas necese fari ĝin pli malfeliĉa kaj malĝoja. Ĉu ne sufiĉe da ruinoj estas faritaj, ĉu ne sufiĉe da sango fluis? Rapiĉu por komenci pacojn de la paco! » La papo restis vokanto en la dezerto. Kelkajn monatojn poste li urĝe petis: « Ne lasu fali en malplenecon ĉi tiun peton de patro kaj amiko! » La homa buĉado ne ĉesis, sed daŭris. Ankaŭ la multaj diplomataj provoj restis sensukcesaj kaj trovis la bojkoton de la registaroj. Kiam en januaro 1922 Benedikto XV-a estis mortanta, unu el liaj lastaj vortoj estis: « Offriamo la vita per la pace del mondo! », « Ni oferu la vivon por la paco de l'mondo! »

Multaj el tiuj, kiuj antaŭ 15 jaroj ne aŭskultis la papon de la paco, ankoraŭ nun regas la naciojn, kaj multaj el la 300 milionoj da katolikoj, kiuj tiam ne sekvis la papon, sed la militkriantojn, ankoraŭ ne ŝanĝis sian spiriton. Ili devus almenaŭ koni la vortojn de Benedikto XV-a. Kaj nun ni ne plu parolos, sed represos la vortojn de Benedikto XV-a mem. Cetere de lia encikliko « Pacem Dei » de 1920 aperis Esperanto-traduko sub la nomo « Kristo kaj la Ligo de Nacioj ». Ĝi estas havebla por 0.20 RM. de la eldonejo La Juna Batalanto.

Justeco anstataŭ armiloj. « La fundamenta postulo devas esti, ke la materia potenco de la armiloj estu anstataŭata per la morala potenco de la juro. » « Ekzistas sendube aliaj vojoj kaj iloj por defendi la justecon. Tiuj, kiuj havas en siaj manoj la sorton de la popoloj, ĉesigu la militadon kaj uzu tiujn aliajn ilojn, pelite per justemo kaj bonvolo. »

Amo kiel bazo de la paco. « Ĉiu paco estas nesolida, ĉiuj kontraktoj estas neefikaj malgraŭ la longaj kaj laboremaj intertraktadoj de iliaj aŭtoroj kaj malgraŭ la solena karaktero de la sigeloj, tiel longe ke ne interpaciĝo instigita per reciproka amo finas malamon kaj malamikecon. »

Internacia amo. « Nenion Kristo rekomendis pli ofte kaj pli insiste al siaj disĉiploj ol la ordonon de reciproka amo, ĉar ĝi enhavas ĉion alian. Kristo nomis ĝin la Nova Ordon, Sia Ordon, kaj Li deziris, ke ĝi fariĝu karakteriza signo de la kristanoj, per kiu ili povu esti diferencigataj de aliaj homoj... La Evangelio ne enhavas unu amoleĝon por individuoj kaj alian leĝon, diferencon de la unua, por ŝtatoj kaj nacioj. »

Amo kaj helpo. « Kristana amo ne elĉerpigas per la postulo, ke ni amu niajn malamikojn kiel fratojn anstataŭ malami ilin; ĝi krome postulas, ke ni donu al ili laŭ la ekzemplo de la Savinto bonvolan helpon. »

Interdependeco de la nacioj. « Krom la motivo de la amo je la fino de milito motivo de praktika neceseco ŝajnas konduki la evoluon al ĝenerala kaj reciproka interpaciĝo de la nacioj: la naturaj rilatoj de reciproka


dependeco kaj de servoj, kiuj kunligas naciojn, fariĝis pli intimaj ol iam pro la kreskanta civiliza sento kaj la mirinde pli grandaj eblecoj de interkomunikado. »

La nacioj devas formi Ligon de Nacioj. « Post la ĝenerala restarigo de la ordo laŭ justeco kaj amo kaj post repacigo de la nacioj estus plej dezirinde, ke ĉiuj ŝtatoj, rezignante je reciproka suspekto, unuigu en unu societo aŭ pli bone en unu familio de nacioj, tiel por garanti ilian propran liberecon kiel por defendi la ordon de la homaro. »

La celoj kaj taskoj de tiu Ligo. « Tiu Ligo de Nacioj estas necesa — por ne paroli pri multaj aliaj kaŭzoj — pro la ĝenerale sentita bezono, fari ĉiajn klopodojn, por forigi aŭ malpliigi la terurajn militajn elspezojn, kiuj ne plu estas tolereblaj; por malebligi estonte teruregajn militojn aŭ almenaŭ laŭeble forigi ilian eblecon; por certigi al ĉiu nacio interne de ĝiaj justaj limoj sendependecon kaj neŭtralecon. »

Malarmado. « Necesa estas honesta interkonsento de ĉiuj, por malpligrandigi la armadojn samtempe kaj reciproke laŭ starigotaj reguloj kaj garantioj ĝis grado, kiu estas necesa kaj sufiĉa por gardi la publikan ordon en ĉiu ŝtato. »

La deviga militservo devas esti forigata. « Por la Apostola Seĝo la sola sistemo, kiu estas efika kaj kiu ankaŭ kun iomete da bona volo en ambaŭ flankoj estus realigebla, estus jena : **per komuna interkonsento** inter civilizitaj nacioj forigi devigan militservon. »



Arbitracio. « Anstataŭ armeoj estas akcelinda la starigo de arbitracio kun sia alta paciga tasko laŭ interkonsentotaj normoj kaj kun sankcioj kontraŭ iu ŝtato, kiu rifuzus submeti konfliktojn al la arbitracia juĝo aŭ akcepti ĝiajn decidojn. »

Libereco de la maroj. « Kiam estos starigita la suvereneco de la juro, oni forigu ĉiun baron en la interrilatoj de la nacioj kaj certigu laŭ interkonsentotaj principoj la veran liberecon kaj komunecon de la maroj. Tio forigus multajn konfliktkaŭzojn kaj malfermus novajn fontojn de la prosperado kaj progreso. »

La Eklezio kiel internacio. « La Eklezio estas perfekta tipo de universala societo kaj enhavas laŭ sia esenco kaj destino mirindan forton, por interfratigi la homojn, ne nur rilate al ilia eterna feliĉo, sed ankaŭ gvidante ilin tra la teraj bonoj, ke ili tamen ne perdu pro ili la eternajn. Ankaŭ el la historio ni scias, ke de post la tempo, kiam la Eklezio penetris per sia spirito la iamajn barbarajn popolojn de Eŭropo, iom post iom ĉesis la diversaj kaj profundaj disigoj. Fine unuiginte en unu samspirita societo ili fondis la kristanan Eŭropon, kiu sub gvido kaj protekto de la Eklezio, laŭante al ĉiu nacio ĝian individuecon, perfektigis en plena unueco, subtenante ilian bonfarton kaj grandecon. Bele pri tio diras Sankta Aŭgustinus: « Malsuprenirante sur ĉi tiun teron, ĉi tiu ŝtato alvokas la burĝojn de ĉiu nacio kaj formas el ĉiuj popoloj unu pilgrimantaron. » ... »

RUSUJO KAJ NI

De Universitata Profesoro Pastro D-ro Wilhelm Schmidt, S. V. D., Romo.

En la katolika revuo « *Schönere Zukunft* » la aŭtoro publikigis kuraĝan artikolon, kiu montras, ke ĉiu batalo kontraŭ la bolŝevismo estas hipokrita kaj sensukcesa, se ni ne serioze laboras por forigi la maljustaĵojn, el kiuj ĝi estiĝis.

Unu preferon havas la bolŝevista malamo kontraŭ la religio kompare al la malnova burĝa materialismo kaj liberpensado : ĝi povas diri, ke tiu malamo estiĝis ne el malamo, sed el amo al la amasoj de la senrajtigataj kaj ekspluatataj laboristoj, kaj ke la malamo ne estas ĝia lasta celo, sed nur ilo por la celo, por la liberigo kaj levado de tiuj laborantaj milionoj.

La rusa bolŝevismo estas tiel giganta fortostreĉo, tiel fanatika kaj universala seriozeco, tiel senlima utiligo kaj koncentrigo de ĉiuj fortoj al unu terure granda celo, en sia maniero tiel grandioza klopodo por forigi ĉion kontraŭan kaj tiel obstina luktado por nova, kvankam utopia konstruado, ke la mondhistorio apenaŭ povas raportari pri io simila... Kie je la kontraŭa flanko, ankaŭ ĉe la kontraŭbatalataj religioj, estas videbla same granda kaj forta klopodo?

Se la bolŝevista Rusujo konsideras la senkompromisan batalon kontraŭ la religio kiel nepre necesa armilo kontraŭ la kapitalismo, ekspluatanta la popolon, ĉu ni forbatis el ĝia mano tiun armilon per klara, komuna, forta kaj obstina batalo kontraŭ tiu fundamenta malbono de la moderna homaro, tiel ke la religio neniel plu povas esti suspektata kiel « paravento » (kaŝilo) de la kapitalismo?...

Batalado de la katolikoj kontraŭ la bolŝevismo, kiu ne superas la heroecon kaj grandecon de la bolŝevismo, estas kondamnita dekomence al malsukceso kaj, naskas eĉ pli malbonajn sekvojn.

DOSTOJEVSKI KAJ NIA TEMPO

De Theoderich Kampmann.

Dostojevski vidas en la familio la ĝermon de la homa socio. Se la familio estas detruiita, la tuta popolo devas putriĝi. Ĉar la « sanktejo de la familio » estas minacita, la ŝtato ŝanceliĝas en siaj fundamentoj.

Je tiu flanko Dostojevski studas la socian vivon de sia tempo kun amanta fervoro. Li vizitas la orfejojn kaj la kolonion de junaj krimuloj kaj faras al si la plej seriozajn pensojn pri la « hazarda patrino », klopodas esplori la animojn de junaj memmortigantoj kaj ankoraŭ pli la animojn de junaj memmortigantinoj, li observas forkurantajn knabinojn kaj cigaredfumantajn knabojn. Neniama poeto pli amis la infanojn ol li, neniama iu pli enpenetris en la mondon de la malgranda homo. Infanmizero estas lia propra mizero, la pureco de la infana animo estas la sopiro de lia maljuneco.

Komprenibile Dostojevski ne nur konstatis la faktojn, li precipe serĉis la radikojn de la malbonoj kaj klopodis trovi kuracilojn. Li studis la patrojn ĉirkaŭ la jaro 1840. Duone ili estas idealistoj, « patentitaj pastroj de la beleco kaj nobleco », kiuj nutras siajn infanojn per ideoj ĝenerale homaj, duone ili estas cinikuloj, « fieraĉaj kaj indiferentaj neantoj », kiuj inokulas en la animon de siaj infanoj du danĝerajn venenojn : la malestimon de la hejmlando kaj la neadon de Dio. Se ili eĉ centoble korekte plenumas siajn eksterajn patrajn devojn, ili plene malzorgas siajn internajn devojn. « Tiuj inertuloj, se ili nur estas riĉaj, plenumas ĉion, kiel estas necese : ili bone vestas kaj bone nutras la infanojn, donas al ili guvernantinojn kaj poste instruistojn; iliaj infanoj eble poste venas al la universitatoj, sed... vera patro tie ne ekzistas. » Sendube Dostojevski vidas la ĉefkaŭzon en la patreco de la elradikiĝinta intelektularo. La situacio de la patroj ŝajnas al la poeto senespera. « La patroj ne plu estas aliĝeblaj, — Dio kun ili! » Sed la « malfeliĉajn infanojn », kiuj per ili estas malbonigitaj, tiujn oni devas savi.

Ekzistas ankoraŭ aliaj kaŭzoj de la infanmizero. Dum ke la liberalaj patroj revas laŭlonge de la realeco, tiu realeco prenas la junulojn per brutala mano. Tie estas la judo, kiu malrapide, sed certe fariĝas « la sinjoro de tuta Eŭropo » kun sia banko kaj sia « monsako ». « En la popolo ŝajnas subite ekregi la penso, ke la monsako estas ĉio, ke sur ĝi estas bazita ĉiu potenco kaj ke ĉio, kion la patroj ĝis nun diris kaj predikis al la popolo, estas pura sensecaĵo. Ve, se tiu ideo fortiĝas en la popolo! » La mono estas al la junularo terura danĝero. La familio pruvas tion, kiu grupiĝas ĉirkaŭ la miliono anstataŭ ĉirkaŭ la hejmlando kaj ĉirkaŭ Dio. « Komprenibile la tuta familio de tia komercisto malgraŭ ekstera brilo kreskas sen ia klereco ». « La riĉeco donas al la animoj de tiu ĝuema kaj impertinenta junularo nenion ol la malvirton en plej frua aĝo kaj la plej malĝustajn ideojn pri la mono, la patrolande, la tero kaj la devo. » La monsako minacas mortigi la junularon kiel la popolon.

Dum kiam la supra klasoj manĝaĉas siajn orbulojn, la malsupra milionoj drinkas brandon. Nova danĝero por la junularo! « La patrinoj drinkas, la infanoj drinkas, la preĝejoj estas malplenaj, la patroj rabas; la bronzan brakon de la Monumento de Ivan Susanin ili forŝegis kaj portis en la drinkejon, kaj la drinkejo akceptis la brakon. » « Vi vendas vian animon por brando, la brandon vi adoras! Kiu donas al vi pli multe da brando, tiu aĉetis vin! » La poeto parolas pri « venenigo de tuta generacio per alkoholo » kaj ekkonas, ke la afero estas sama supre kaj malsupre : « Ĉiuj estas malfortiĝintaj, la koroj grasiĝis : ĉiuj soifas je dolĉaĵo, je materiaj utiloj. Ĉiuj estas laŭ karaktero sklavoj. » Kaj denove estas la tasko, savi la junularon.

Monsako kaj brando estas kunligitaj kun la fabrikejo. « La ora epoko ankoraŭ tute estas en la estonteco, sed nun regas la industrio ». Al la brilanta lako de la supra korespondas la putriĝo de la ligno kovrita per la poluro. Dostojevski akre rigardas malantaŭ la kulisojn. La « mirakloj de la tekniko » aklamitaj de la publiko lasas lin malvarma. li nur havas skeptikan ridetadon. Optikai trempoj, kiuj nur instigas lin al la demando : sed la homo, la vivanta homo!

Sed la kreskanta junularo! « Rigardu nur, kio okazas en tiuj fabrikejoj. Dekdujaraj knabinoj jam serĉas amantojn. Malgrandaj laboristoj drinkas brandon kiel akvon. Oni aŭdas nur malĉastan blasfemadon kaj ĝemadon — la plej malluma infero estas tio. La infanoj lernas de la granduloj! Estas pereoj por niaj infanoj, ke ili iradas en la fabrikejojn! Ĉu oni do trovas en tiuj fabrikejoj unu solan honestan junulinon, unu solan junulon, kiu ne drinkas? »

Dostojevski parolas pri la maskumado de la « bona societo ». « Ĉiuj interparoladas milde, t. e. eksterordinare ĝentile kaj speciale gaje » : ĉiuj estas arlekenoj. La festoj de sentalentaj gepatroj. La profesiaj instruistoj, kiuj havas la edukadon nur kiel panodonan metion. « El mia tuta infaneco mi rememoras nenion veran pedagogiiston kaj ne kredas, ke ekzistas multaj, ĉiuj estas oficistoj ricevantaj sian salajron. » Eĉ la instruantaj pastroj estas oficistoj. « Mi ĉiam devas pensi pri la malnovaj batalantoj de la kredo kaj predikantoj de la Evangelio, kiuj migradis nudkape kaj nudpiede, suferis batojn kaj persekutojn kaj predikis Kriston ankaŭ sen plialtigo de la salajro ». Kaj la savo de la junularo? Dostojevski atendas ĝin nur de la unuopa individuo. Se tie kaj ĉi tie homoj venas al konscio, komprenas la Evangelion kaj komencas vivi el ĝi, tiam tiuj unuopuloj fariĝos la « lumo de la mondo » kaj la « salo de la tero ». Ne novaj metodoj! Ne grandaj predikoj! Ne socialistaj fantazioj! « La unuopuloj estas tiuj, kiuj trenas ĉiujn post si, gvidas la homojn, naskas la ideon kaj postlasas ĝin kiel heredaĵo al la turmentataj homamasoj. » Tiel devas esti komprenataj la postuloj de Dostojevski, ne kiel demagogiaj postuloj de babilanta utopiulo.

Antaŭ ĉio : lumon kaj aeron kaj teron por la infanoj! « Infanoj devas esti naskataj sur la kampara tero kaj ne sur la grandurba pavimo. » « Poste oni ja povas vivi sur la pavimo, sed naskiĝi kaj kreskadi devas la plimulto de la nacio sur la tero, sur la kamparo, sur kiu kreskas la greno kaj la arboj. »

« Laŭ mia opinio la tuta ordo kuŝas en la tero kaj venas el la tero, kaj tio estas ĉie, en la tuta homaro. » « En la tero, en la kampo estas io sakramenta. » « De la tero estas ĉio, de la tero venas ĉio, la libereco, la vivo, la honoro, la familio, la infanoj, la ordo, la Eklezio, — unuvorte ĉio valoras. » La fabrikejo povas resti, laŭ ĝia esenco ĝi estas io natura. Nur ĝi ne rajtas mortpremi la homojn, la fabrikejo devas stari « meze inter ĝardenoj ».

Kaj la familio kreskinta sur la tero estas la dua afero, kiu estas necesa por maturiĝanta infano. En ĝi la rusa virino, la patrino, havas la centran rolon. La rusa virino estas al la poeto pli valoro ol la rusa viro : ĝi malplimulte malproksimiĝis de la tero, en ŝi ankoraŭ fluas fontoj de vivanta vivo, ĉion Dostojevski atendas de ŝi. « Nur malofte iu el ni scias — diras la juna verkisto —, kiom da senfine pacienca amo, kiom da kompatoj kaj pardono povas esti en multaj virinaj koroj. » Kaj la maljuna poeto konstatas : « La virinoj estas nia granda espero, kaj eble ili helpas Rusujon en la tragika momento. »

Ĉi tiun tre interesan artikolon ni prenis el nova aktuala libro « Licht aus dem Osten, Dostojewskis Grunderkenntnisse über die menschliche Gemeinschaft von Theoderich Kampmann » kun afabla permeso de la eldonejo Bergstadtverlag en Breslau. Prezo de la libro tolbindita 5.50 RM., kartonita 4.20 RM. La libro pritraktas la eternan demandon de Dostojevski : Ĉu homa komuneco estas ebla?

KATOLIKA VIVO + JUNA BATALANTO. Tiujn du katolikajn gazetojn redaktatajn en Esperanto abonu kune per sendado de 6.— RM. por tuta jaro aŭ 3.— RM. por duona jaro al la Eldonejo La Juna Batalanto!

Tra la Internacia Ekspozicio de la Katolika Junularo

La ekspozicio de Bruxelles en la Instituto Saint-Louis estis granda sukceso kaj grava dokumentaro pri la Katolika Agado de la junularo. La modela kunlaboro de multaj naciaj kaj internaciaj asocioj estis kreinta imponan demonstracion de la katolika junularo tutmonda. Ni jam mallonge raportis en la septembra numero de la Juna Batalanto, tamen la ekspozicio estis sufiĉe interesa, por instigi nin, inviti niajn gelegantojn al mallonga promenado tra la katolika junularo aŭ — tra la Instituto de Sankta Ludoviko.....

Belgujo. La katolika organizaĵo imueca por la franclingva parto estas la aktiva kaj potenca A. C. J. B. (Asocio Katolika de la Junularo Belga). Ĝi konsistas el fakaj organizaĵoj: Katolika Laborista Junularo (J. O. C.), Katolika Kamparana Junularo (J. A. C.), Katolika Studenta Junularo (J. E. C.), Katolika Universitata Junularo (J. U. C.), Katolika Sendependula Junularo (J. I. C.), Patronejoj kaj Skoltoj. La A. C. J. B. estas la centra organizo kun centraj servoj kaj kontaktoj al la agadoj en ĉiuj kampoj de la moderna vivo: gazetaro, radio, filmo, vojaĝservo, anoncervo ktp., Jen frapas nin la triumfa marŝado de la laborista junularo tra la plej « ruĝaj » rondoj, jen la praktikaj servoj de la studenta junularo, kiu ekz. eldonis bonegan « manlibron de la karieroj » por profesia konsilado, jen la agadoj kontraŭ la persekuto en Meksiko, kontraŭ la bolŝevismo, kontraŭ la malbona literaturo kaj gazetaro. La belga junularo batalas por sia reĝo: Kristo!

Meksiko. Emociigaj bildoj el la epoko de la persekuto, fotografajoj pri la antempaj martiroj. Jen dokumentoj pri la heroo batalo de la katolika junularo en tiu lando, ekzemploj de kontraŭlegaj gazetoj kaj flugfolioj el la plej malbona tempo, broŝuroj kaj libroj en ĉiuj lingvoj, kiuj informis la katolikan publikon tutmondan, kaj super la tuta dokumentaro — aŭtentika standardo de la « Cristeros ». Publikigajoj el la plej nova tempo montras la nunan laboradon de la A. C. J. M. (Asocio Katolika de la Junularo Meksikana) kun sia rekonstrua agado.....

Litovujo. lando kiu ankaŭ devas batali kontraŭ diktatoreco kontraŭkatolika. Multspeca bildo pri la agado de la litova junularo, ĝia gazetaro kaj libraro, kiu estas te grava por popolo, kiu ne posedas grandan literaturon.

Polujo. Ĝia ekspozicio estis unu el la plej interesaj kaj variaj. Belaj dekoracioj kun bildoj el la pola popola vivo. Disvastigo de bona literaturo kaj klerigo pri la danĝeroj de la bolŝevismo, kiu ja regas la najbarajn landojn orientajn, estas speciale montrataj.

Italujo ekspoziciis iom da materialo. Por ampleksa montrado de la tiea junulara agado la tempo ne estas favora.

Hispanujo. Ankaŭ tiu lando sendis ekspoziciaĵojn. Ekzistas en Hispanujo kelkaj tre atentindaj lokaj asocioj kaj landaj organizaĵoj, sed vere intensa tutlanda agado ankoraŭ ne estas efektivigita. Se oni estus pli bone preparinta la katolikan junularon de tiu lando al ĝiaj taskoj, la nuna situacio de la hispana katolikaro estus malpli tragika.

La malgranda *Svisujo* kaj la pli malgranda *Luksemburgo* montris interesajn skemojn kaj dokumentaron de publikigajoj.

FranCUJO havis (kompreneble krom Belgujo) la plej ampleksan kaj interesan standon, kiu estis tre moderne prezentata. Specialan atenton meritis la ekspozicio de la Kristana Laborista Junularo kaj de la Katolika Marista Junularo, kiu en multaj ŝipoj, en havenoj kaj maristaj lernejoj jam havas siajn grupojn. La iom-post-iom-a transformo de la A. C. J. F. (Asocio Katolika de la Junularo Franca) el elito en amasan organizaĵon kaj la evoluigo de la specialaj profesiaj asocioj estis efike prezentata.

Germanujo. La Katolika Junularo de Germanujo ne povis, kiel ĝi estus dezirinta, partopreni per ampleksega ekspozicio, ĉar la situacio en Germanujo necesigis koncentrigon de ĉiuj fortoj al la enlandaj taskoj. Do estis necese, fari rigoran elekton de la plej grava materialo. Tamen la germana ekspozicio bone

sukcesis kaj altiris multe da vizitantoj. Specialan aplaudon trovis la novaj modernaj koloraj kaj tamen simplaj standardoj de la asocioj, la ekstera aranĝo de la junulargazetoj kaj la multnombra membraro de la diversaj asocioj (entute 1 1/2 milionoj en 30 asocioj).

Internaciaj ekspozicioj estis montrataj de la *Katolika Junmeciista Unuiĝo* kaj de *Mondjunularo Katolika* (MOKA). La Kolping-filoj skizis la belegan evoluon de sia unuiĝo, fondaĵo de Kolping, la granda apostolo de la katolika laborista junularo, la internaciecon de sia movado kun literaturo en germana, angla, hungara, nederlanda, franca, ĉeĥa lingvoj. — Kaj MOKA montris siajn alvokojn por la paco kaj la internacia kunlaboro, siajn praktikajn instituciojn, efike varbis por Esperanto kiel necesa ilo de internacia kunlaboro. Multegaj vizitantoj petis klarigojn, kaj ankaŭ kelkaj episkopoj rigardis kun intereso la ekspozicion de Mondjunularo Katolika kaj la kajerojn de La Juna Batalanto.

Bruxelles havis belan internacian ekspozicion de la katolika junularo. Ni esperu, ke la tempo ne estas tro malproksima, kiam ĉiuj asocioj, kiuj sendis sian dokumentaron kaj siajn delegitojn al Bruxelles, iniciatos, kiel Lia Kardinala Moŝto Van Roey diris al ni dum nia vizito, fratan kunlaboradon internacian. Vivu la Internacio de la Katolika Junularo!

UNUECA LINGVO

De Richard Kralik. Esperantigis Alois Norbert.

Ĉu ebligas, ho homaro.
Ke per help' de Dia grac'
Venu fino por eraro,
Por disputo kaj malpac?
Post konfuzo Babilona,
Cu obligas, ke l' Sinjor'
De la mond' malamodrona
La disecon prenu for?

Povus tiel nur regadi
Sur la tero am' kaj pac'.
Se sukcesus forigadi
Ni la fonton de l'malpac';
Se komunan lingvon Dio
Redonacius al homar',
Se konkorde la nacioj
Sin komprenus sen erar'.

Kun la helpo de l'Sinjoro
Provis bonaj viroj jam
Kun konfido en la koro
La spiriton de l'malam'
El la mondo forigadi
Kaj kun nobla bonkorec'
Ĉiujn homojn kunligadi
Por la lingva unuec'?

Danku ni al tiuj viroj
Kaj kun forto kaj fidel'
Sekvu al la pioniroj,
Ni konfide al la cel'
Ĉar ja al la disĉiplaro
Diris Kristo, la Sinjor' :
« Estu unu vi frataro! »
Ŝiru ni la barojn for!

Kunfratigi la homaron
Per samlingva vort' koj dir',
Estas vere inda faro
De la katolika vir'.
Venu do al rondo nia,
Metu ĉiujn dubojn for!
Kun la ĉefo eklezia
Pensu ankaŭ nia kor'!

Kion eĉ la papo benas,
Tio estas benindaj'.
Inda, ke vi ĝin subtenas
Kaj defendas kun kuraĝ?
Bone statas la afero.
Sub devizo de l'esper':
Venku, regu la espero
Paci ganta sur la ter'!

ĈIU LEGANTO de J. B. estu propagandisto kaj varbu novajn abonantojn! Ni bezonas kelkajn centojn, por povi plibeligi kaj pli-grandigi nian gazeton!

KATOLIKAN ESPERANTO-LITERATURON aĉetu de la eldonejo La Juna Batalanto! Prezaron vi trovas en ĉi tiu numero!

Interparolado pri la Katolika Esperanto-Literaturo

Karlo. Estas skandalo ĉiam denove aŭdi pri novaj libroj kun bolŝevista aŭ alia kontraŭkristana tendenco kaj samtempe vidi, kiel malgranda ankoraŭ estas la katolika Esperanto-literaturo. Ĉu do ne estus eble, ke ni almenaŭ same multe laboru kiel tiuj aliaj ?

Vilhelmo. Montrigas ĉiam denove laŭ la Evangelio, ke « la infanoj de ĉi tiu mondo en sia maniero estas pli saĝaj ol la infanoj de la lumo ». Cetere vi ne estas tute prava : Jam ekzistas sufiĉe multaj katolikaj verkoj kaj broŝuroj en Esperanto. Ili rapide plimultiĝus, se — la katolikoj pli multe aĉetus ilin!

Karlo. Sed ni havas preskaŭ nenion, se ni komparas nin kun la komunistoj. Ĝus mi legis, ke en Rusujo la Centra Komitato de Sovetlanda Esperanto-Unuiĝo decidis, eldoni en la sekvonta jaro 12 volumojn de la plej gravaj verkoj de Lenin en Esperanto kaj ke la ĵus aperinta libro « Fundamentoj de Leninismo » de la soveta diktatoro Stalin kvazaŭ estas la enkonduko en tiujn verkojn de Lenin, Marx, Kropotkin, Radek, Barbusse, Toller, Lenin, Stalin, de ili ĉiuj oni povas trovi gravajn verkojn en Esperanto-tradukoj. Jen la titoloj de kelkaj verkoj, kies sola celo estas, batali kontraŭ la religio :

Servud, La vero pri la persekutoj kontraŭ religio en U. S. S. R.,
Buĥarin, Financa kapitalo en papa mantelo,
Sejnman, Moralo religia kaj moralo proleta,
Sejnman, Milito kaj religio,
Lenin, Pri religio.

Pri verkoj, kiuj en sia ĝenerala enhavo aŭ en kelkaj partoj atakas religion kaj moralon, mi nun ne volas paroli. Ili ne estas dekoj, sed centoj...

Vilhelmo. Prave vi atentigas pri ĉio ĉi. Sed bonvolu ne forgesi, ke ankaŭ la katolika Esperanto-literaturo jam konsistas, se ne el centoj, tamen el centoj da libroj !

Karlo. Ĉu vere ? Pri tio mi neniam aŭdis. Bonvolu montri al mi la liston !

Vilhelmo. Tion mi bedaŭrinde ne povas. Ĉar multaj jam estas elĉerpitaj, inter ili preskaŭ ĉiuj libroj eldonitaj antaŭ la milito. Tamen ankaŭ nun vi havas sufiĉan elekton de katolika Esperanto-literaturo, bonvolu rigardi la libroliston de la eldonejo La Juna Batalanto...

Karlo. Tamen vere ni havas tre malmulte da libroj, kiujn ni povas kompari al la kontraŭkatolikaj verkoj. Mi ja scias, ke ekzistas sep aŭ ok preĝlibroj kaj sufiĉa nombro da piaj rakontoj, sed ni vere havas nur tre malmultajn modernajn kaj valorajn verkojn...

Vilhelmo. Iomete vi estas prava, sed ne tute. Ankaŭ mi preferus, ke ni anstataŭ la pli ol 100 katolikaj Esperanto-libroj kaj libretoj, kiuj iom post iom estas publikigitaj, havu nur 20 librojn, sed zorge elektitajn, modernajn, modele eldonitajn kaj — ĉiam haveblajn. Ekz. la Evangelioj, kiuj estas eldonitaj en Esperanto jam antaŭ la milito, nenie estas haveblaj, kaj do ni nun posedas eĉ ne unu parton de la Sankta Skribo, kiu estus eklezie aprobata kaj tiel permesata por legado al la katolikoj.

Karlo. Cetere multaj kleraj katolikoj, kiuj posedas la indekspermeson de sia episkopo, havas la Bibliion en la Londona eldono. Tiu 1000-paĝa Esperanta-traduko de la Sankta Biblio estas ankaŭ tre malmultekosta, nur 6 markojn ĝi kostas, sed ĝenerale ĝi ja estas malpermesata por katolikoj. Ni devus havi almenaŭ kelkajn bibliopartojn en eldono katolika... Kaj la Imitadon de Kristo ni bezonus. Oni jam antaŭ dek jaroj anoncis ĝian publikigon, sed fakte ĝi neniam realiĝis, kvankam, kiel mi aŭdis, la manuskripto estas tute preta kaj reviziita...

Vilhelmo. Ho, tute ne ekzistas manko je pretaj manuskriptoj ; sed mankas mono por la eldono. Kaj tiu mono por la eldono tial, ĉar la katolikaj Esperantistoj ne aĉetas la literaturon jam ekzistantan, sed preferas amuzadon kaj ludadon per Esperanto. Per svingado de verdaj flagoj vere nia afero ne sukcesos. — Sed, por denove veni al nia temo, ni havas kelkajn katolikajn ĉefverkojn en Esperanto. Pensu pri la fajra kaj revoluciiga Historio de Kristo de Giovanni Papini kaj pri la bela katakombano Fabiola ! Cetere ambaŭ verkoj taŭgas, por esti donataj ankaŭ en la manon de nekatolikaj Esperantistoj.

Karlo. Jes, tio ŝajnas al mi grava, ke ni ne havu iajn piajn verkojn, sed librojn kun vere apostola kaj mondĝajnanta karaktero, ĉu en la formo de literatura verko, ĉu en la formo de profunda faka libro. La plej diversaj kaj la plej strangaj sektoj kiel ekz. Oomoto el Japanujo faras propagandon per Esperanto, kaj ŝajne multaj per tio estas gajnataj. Kial do ni kristanoj ne estas la fermento, kiu penetras la mondon, kial do nia katolika Esperanto-literaturo ne estas apostola agado inter la nekatolikaj Esperantistoj ?

Vilhelmo. Vi tie tuŝas problemon, pri kiu oni povus longe mediti kaj diskuti. Cetere La Juna Batalanto estas ankaŭ legata de protestantoj, judoj, socialistoj kaj anarkiistoj. Eĉ kelkaj gvidantoj nekatolikaj estas pagantaj abonantoj. Kaj ĝi klopodas pozitive montri la katolikan veron kaj objektivajn raportojn.

Karlo. La libroj de Papini kaj Wiseman havas unu malavantaĝon : Ili estas tre dikaj kaj relative multekostaj.

Vilhelmo. Sed ja ekzistas ankaŭ tuta serio da libretoj po 20, 25 aŭ 50 fenigoj. Kaj ekzistas kelkaj pli grandaj, kiuj estas haveblaj je tre favoraj kondiĉoj. Ekzemple la ĉefverko de Reinke « Naturscienco, Mondkoncepto, Religio », kiu kostis unue 4 markojn, unu kostas nur unu markon. Fabele malalta prezo! Kaj la libro estas scienca kaj tamen facile komprenebla traktaĵo pri la grava problemoj...

Karlo. Do vi pensas, ke oni devas aĉeti pli multe da libroj, por ebligigi la eldonon de novaj ?

Vilhelmo. Jes, tia estas mia opinio. Kompreneble venas ankoraŭ aliaj problemoj, sed eble pri ili ni parolos alian fojon, ĉu ne ?...

SUR NIA LIBROTABLO

Recenzejo de novaj libroj de internacia intereso.

VADEMECUM ad usum studentium catholicorum in universitatibus extraneis versantibus. Edendum curavit PAX ROMANA, 304 pĝ., Fribourg (Svis.) 1930.

Praktika adresaro por katolikaj studentoj, kiuj intencas studi eksterlande. Pri la universitatoj, praktikaj helpinstitucioj por studentoj, katolikaj studentaj asocioj ktp. oni trovas ĉion utilan. 18 landoj estas pritraktataj. En antaŭparolo la eldoninto motivas en germana kaj franca lingvoj, kial en la libro estas multe

ĈU VI SERĈAS BELAN KATOLIKAN PREĜLIBRON EN ESPERANTO?

Ni rekomendas al vi la bele eldonitan, 336-paĝan, malmultekostan

MIGRUKUNMI

de Pastro J. Saŭren, trad. Pastro Francesko de Paŭla Clemente. Ĝi enhavas la plej necesajn preĝojn, instruadojn kaj vivregulojn por katolikaj junuloj kaj viroj.

| | |
|---|----------|
| Prezoj : tole bindita | 1.65 RM. |
| surrogatlede bindita | 2.25 RM. |
| ŝaflede bindita | 3.75 RM. |
| kaprolede bindita kun fleksebla luksa ingo | 5.00 RM. |

Aliaj katolikaj preĝlibroj en Esperanto :

| | | |
|--|-------|----------|
| <i>Katolika Preĝareto</i> , 32 pĝ., | broŝ. | 0.50 RM. |
| <i>P. M. Carolji, Katolika Preĝlibro</i> , 160 pĝ., | broŝ. | 0.80 RM. |
| | bind. | 1.40 RM. |
| <i>Spirita Juvelaro</i> , 291 pĝ., | bind. | 3.30 RM. |
| <i>L. Chiba, Kantaro Katolika</i> , 40 kantoj kun notoj, 80 pĝ., | | 2.00 RM. |

Aldonu 10 % de la sumo por sendkostoj!

Eldonejo LA JUNA BATALANTO, Köln-Dellbrück, Bensb. Marktweg 63.

uzata — la latina lingvo. Cetere apude oni multege uzas francan, germanan kaj anglan lingvojn. La Vademecum estas rekomendinda al ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la internacia vivo, ĝi estas pruvo, ke Pax Romana jam venis en pli aktivan fazon de sia evoluo.

La Messe Byzantine, Traduction française par le Prince VI. Ghika, docteur en théologie, « Istina », 59, Rue de la Barre, Lille, 56 pĝ.

La Pannykhide, trad. R. P. Hubatzek O. P., 16 pĝ., Istina.

Vendredi Saint, Traduction des Vêpres de rite Byzantino-slave, 32 pĝ., Istina.

Pâques. Les Matines de rite byzantin, 28 pĝ., Istina.

Kompreni niajn orientritajn fratojn, la katolikojn kun Romo unuigitajn, kiel ankaŭ la skismulojn, estas granda apostola tasko, pri kiu nia gazeto jam ofte atentigis. Ni komprenos ilin pli bone, se ni konas kaj komprenas ilian sanktan liturgion. Ĝi ja same estas estiĝinta kun la helpo kaj inspiro de la Sankta Spirito kiel la latina... La francaj tradukoj faritaj en la Seminario de Sankta Basilio en Lille estas bonegaj! Studu tiujn libretojn! La unua estas la liturgio de Sankta Joannes Chrysostomus, la dua la soleno por la mortintoj, kaj la du aliaj montras la plej belajn partojn el la preĝoj de la Sankta Vendredo kaj de Pasko.

Kalender katholischer Jugend 1932. Eldonis P. E. Drouven S. J., 336 pĝ., Freiburg 1931, Herder; tolbind. 1.80 RM.

Der Herrgott sucht Helfer; Aufrechten-Kalender 1932. Berlin SW, Hoheneckverlag, 40 pĝ., 0.30 RM.

Du rekomendindaj kalendaroj, la unua por la katolika junularo, speciale por lernantoj kaj studentoj, la dua por infanoj.

Frank Matzke, Jugend bekennt: So sind wir! 3-a eldono 380 pĝ., Leipzig 1930, Verlag Philipp Reclam jun., kart. 4.50 RM., tolbind. 6.00 RM.

Libro pri problemoj de la juna generacio. Ĝi volas esti konfeso. La valoro de tiu konfeso tamen ŝajnas esti limigita al parto de la junularo. La verko estas valora por pedagogiistoj, multaj aferoj estas frapante klare diritaj. Kontraŭ multaj aliaj ni devus protesti...

Ida Friederike Coudenhove, Gespräch um die heilige Elisabeth, ein Dialog über die Heiligkeit, 96 pĝ., Frankfurt 1931, Carolus-Druckerei, kart. 1.90 RM.

Historio kaj legendo kombiniĝas ĉirkaŭ niaj sanktuloj, tiel ke oni ofte perdas la komprenon. En kio do konsistas la sankteco? Kiel rilatas naturo kaj supernaturo, homa nobleco kaj sankteco unu al la alia? En la formo de dialogo Ida Coudenhove parolas pri Sankta Elisabeth. Multaj homoj, speciale niaj junulinoj, legos tion kun profunda intereso kaj utilo.

Malgrandaj notoj

Gojan Kristnaskofeston ni deziras al niaj legantoj tutmondaj. En ĉiuj mizeroj ni ne volas malesperi, sed gardi nian kredon je la Savinto, kiu fariĝis malforta kaj malriĉa pro ni kaj kiu fortigos nian malforton!

Se vi bezonas librojn, bonvolu pensi pri la librejo de La Juna Batalanto, de kiu vi povas postuli prezarojn. La profitoj estas uzataj por nia gazeto.

Eraro troviĝis en la lasta (septembra) numero sur paĝo 27. La poemo «Al la ŝcvinistoj» ne estas de Walter Mudrak, sed de la germana poeto Friedrich von Bodenstedt (1810-1892). La tradukinto, kiu ricevis la poemon de nia amiko Mudrak, erare opiniis, ke li estas la aŭtoro.

Al multaj, kiuj ankoraŭ ne pagis sian abonprezon por la nuna jaro, la eldonejo sendis admonilojn. Ili bonvolu plenumi la devon de honestaj homoj kaj sendi al ni la modestan sumeton. Dankon antaŭe!

Kelkaj rubrikoj, kiuj ĝenerale troviĝas en La Juna Batalanto, devas esti prokrastataj. Pardonon!

Por propagando en germanlingvaj regionoj oni povas bone uzi nian novan germanlingvan kvarpaĝan flugfolion. Per la bonvola subteno de amika pastro ni povis presigi 10 000 ekzemplerojn sur bona blanka papero. La prezo estas 0.80 RM. por 50, 1.50 RM. por 100 ekzempleroj.

La redaktoro de La Juna Batalanto estos fine de novembro en Paris, komence de januaro en London. Gesamideanoj, kiuj deziras renkonti lin, bonvolu skribi.

Prezaro de Esperanto-Libroj

Eldonejo LA JUNA BATALANTO, D-ro W. Solzbacher, Köln — Dellbrück, Bensberger Marktweg 63, Germanujo.

1. MALMULTEKOSTA KATOLIKA ESPERANTO-LITERATURO.

Papo Benedikto XV-a, Kristo kaj la Ligo de Nacioj. La encikliko Pacem Dei en Esperanto-traduko kun aldono de paca alvoko el la jaro 1919, 16 p. 0.20 RM,

Papo Pio XI-a, Encikliko pri la Universala Reĝeco de Kristo, 24 p. 0.25 RM,

J. J. Kraszewski, Kiel mortis la unuaj kristanoj. Rakonto el la tempo de la tirana persekutado de la kristanoj. Nerono ; 32 p. 0.25 RM,

Anna von Krane, Graco atendanta. Rakonto el la tempo de Kristo, 12 p. 0.20 RM,

F. Prust, Tarcizio. Drama legendo el prakristana herotempo. Taŭga por teatra prezento. 20 p. 0.20 RM,

Th. Monnens S. J., Nova Afriko. Profunda studo pri la estonteco de la « nigra kontinento » kaj la rolo de katolikismo en tiu lando. 32 p. 0.25 RM,

J. de Vreese, Esperdona Islando. Ilustrita libro pri popolo kaj lando kaj ĝia historio laŭ la katolika vidpunkto. 40 p. 0.85 RM,

J. Schmidt, La origino de la religio. Originale verkita en Esperanto, riĉe ilustrita, pritraktanta gravan teologiaĵon, sed nur laŭ antropologia natura vidpunkto. 32 p. 0.50 RM,

Albert Bessières S. J., Parvuli. Rakonto pri infano. 32 p. 0.25 RM,

L. Frank. La patro. Skizo kontraŭmilita, aperinta 1920 en la felietono de Katolika Mondo. 16 p. 0.20 RM,

La Floretoj de Sankta Francisko. La « Fioretti » en bonega Esperanto-traduko. 174 p. 1.60 RM,

M. Caroli O. F. M., La reformanto. Biografio de Sankta Francisko, bele ilustrita, verkita originale en Esperanto. 88 p. 1.60 RM,

M. Caroli O. F. M., La Padova Lilio. Biografio de Sankta Antonio. 119 p. 1.50 RM,

Myriam Catalany, Klari, Romano. 136 p. 1.60 RM,

Franjo Medrijan, Febeloj, speciale taŭgaj por infanoj, 32 p. 0.45 RM,

De Maistre, Vojaĝo interne de mia ĉambro. 58 p. 0.60 RM,

Litova Almanako. Kolekto de interesaj artikoloj pri literaturo penso kaj vivo de la malgranda litova popolo. Enhavanta ankaŭ kelkajn artikolojn de Prelato Prof. A. Dombrovski, 288 p. Malmultekosta favorprezo : 1.50 RM,

Prof. D. Dr. Dr. Reinke, Naturscienco, Mondkoncepto, Religio Famkonata verko de granda natursciencisto en Esperanto-traduko de E. Brenken. Prezo malaltigita kaj nun tiel favora, ke ĉiu katolika Esperantisto devus mendi la verkon : 1.00 RM,

2. KATOLIKAJ PREGLIBROJ.

Katolika Preĝareto. Nova eldono de la ŝatata preĝlibreto de Pastro Meŝtan. 32 p. 0.50 RM,

P. Modesto Caroli O. F. M., Katolika preĝlibro. La plej bona moderna preĝlibro. 160 p. broŝ. 0.80 RM,

bind. 1.40 RM,

Spirite Juvelaro. Katolika preĝlibro 291-paĝa bind. 3.30 RM,

Sauren, Migrukunmi. Katolika preĝlibro por viroj kaj junuloj. Bonega eldono, 336 paĝoj, duontole bind. 1.65 RM,

surogatilede bind. 2.25 RM,

ŝaflede bind. 3.75 RM,

kaprolede bind. 5.00 RM,

L. Chiba, Kantaro Katolika. 40 preĝejaj kantoj kun notoj, 80 p. 2.00 RM,

3. KATOLIKAJ ĈEFVERKOJ EN ESPERANTO.

Kardinalo Wiseman, Fabiola. La mondkonata roĵano pri la katakomboj en bonega Esperanto-traduko de Ramo, jam en dua eldono! 440 paĝoj, 8 luksaj ekstertekstaj bildoj kaj multaj ilustraĵoj en la teksto. Modelo de bona Esperanto-stilo. 6.00 RM.

Giovanni Papini, Historio de Kristo. La famkonata « Storia de Kristo » de la granda itala poeto en Esperanto-traduko farita laŭ speciala deziro de la aŭtoro. 608 p. broŝ. 9.50 RM.
tolbind. 11.50 RM.

4. REKOMENDINDAJ MODERNAJ LIBROJ EN ESPERANTO.

Erich Maria Remarque, En Okcidento Nenio Nova. La famkonata libro pri la milito. 252 p. broŝ. 5.00 RM.
tolbind. 7.00 RM.

Erich Maria Remarque, La Vojo Returnen. Ankaŭ la dua verko de Remarque aperis en Esperanto. broŝ. 6.00 RM.
tolbind. 8.50 RM.

L. L. Zamenhof, Originala Verkaro. La originalaj verkoj de la aŭtoro de Esperanto en luksa eldono. 605 p. kun 6 faksimilaĵoj kaj portreto. lukse tolbind. 10.00 RM.

5. LIBROJ POR PLIPERFEKTIĜO EN ESPERANTO.

D-ro L. L. Zamenhof, Fundamento de Esperanto. La ĉefverko, caro. Universala Vortaro kun tradukoj en angla, franca, germana, rusa kaj pola lingvoj. 196 p. 1.20 RM.
rusa kaj pola lingvoj. 106 p. 1.20 RM.

D-ro L. L. Zamenhof, Fundamenta Krestomatio. Eksterordinare riĉa kolekto de interesaj artikoloj el literaturo, poezio, scienco de ĉiuj landoj kaj originalaj verkoj en Esperanto. 472 p. 3.00 RM.

D-ro Edmond Privat, Karlo, ŝacila legolibro. Libreto de klasika simpleco kaj beleco. Trege rekomendinda! 0.50 RM.

Kabe, Vortaro de Esperanto. Internacia vortaro verkita nur en Esperanto kaj donanta difinojn de la vortoj, 175 p. lukse bind. 1.70 RM.

6. LIBROJ POR LA PACA MOVADO.

Kontrakto de la Ligo de Nacioj. En angla kaj franca lingvo kun traduko en Esperanto, 32 p. 0.85 RM.

Nilsson, Datoj kaj faktoj pri la paca movado 1.20 RM.

Coudenhove-Kalergi, Paneŭropa Manifesto 0.50 RM.

D-ro Winfried Fricke, Batalantoj por la Homara Paco, 0.40 RM.

Immanuel Kant, Al Eterna Paco, filozofia traktato. 2.00 RM.

Lakshmisvar Sinha, Kaj ĉio restas penso, sed ne fero. 0.60 RM.

7. Por varbado.

J. Bianchini, Parva Grammatica Internationalis Idiomatis Esperanto. Esperanto-gramatiko kaj vortaro en latina lingvo. 40 p. 0.45 RM.

D-ro Emil Pfeffer, Esperanto in 10 Unterrichtsstunden. Taŭga enkonduko germanlingva, 48 p. 0.30 RM.

Esperanto, Premier-Manuel. Franclingva lernolibreto kun vortareto, 32 0.15 RM.

Internationale Hulptaal Esperanto, Leerboekje. La sama en nederlanda lingvo, 32 p. 0.15 RM.

POSTULU SPECIALAJN LISTOJN PRI LERNOLIBROJ, VORTAROJ KAJ EKZERCAJ LIBROJ EN NACIAJ LINGVOJ!

Ni ankaŭ liveras ĉiujn aliajn Esperanto-librojn je originalaj prezoj!

Liverkondiĉoj : Ni nur liveras librojn kontraŭ antaŭa pago. Uzu la poŝtkontojn de LA JUNA BATALANTO ! Ni akceptas monbiletojn, ĉekojn, poŝtmandatojn, Internaciajn Respondkuponojn de la poŝto kaj UEA-kuponojn.

Por sendkostoj aldonu 10 % de la sumo. Liveraĵoj de pli ol 10.— RM. en Germanujo. Aŭstrujo kaj Litovujo, de pli ol 20.— RM. en aliaj landoj estas farataj sen fakturigo de sendkostoj.